

## & Epigramoj:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:37> (/do dore doTi LaSo; do dore mimi mimi; milfa soso somi mire; dolre doTi LaLa LalSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×8 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Epigramo:

'1 /Aŭtoro aŭtentika, ; ne nur versfare lerta ; Se2d ankaŭ gramatike ; Sa2mkiel majstro certa,

(×:; **Zorgojn li foje forgesas ; Kritikantojn interesas ; Erareton faris li ; Zorgojn li foje forgesas.**)

'2 Publikis tiun frazon: ; "Min ĉiuj tre estimas, ; Ĉar mi en ĉiuj kazoj ; Perfekte min esprimas." .....

'3 Sed kelkajn ĵaluzulojn ; Ĉi tiu fraz' surprizis ; Kaj ili ĝin skrupule ; Ĝis fundo analizis. ....

'4 Ĝi – sub ilia knedo – ; Fandiĝis kiel vakso, ; Kaj sekvis la dekreto: ; "Eraro de.. sin-takso!" .....

#### ,& Alia epigramo:

'5 Tre konata recenzisto ; Skribis foje en recenzon ; Saĝan frazon, kies sencon ; Fuŝkripligis la presisto. ....

'6 Tiu fraz' aperis jene: ; – (Aŭ almenaŭ proksimume,; Ĉar mi citas nur resume ; Ne povante citi plene) – .....

'7 "Nun ankoraŭ tre modestas ; Niaj libroj kaj gazetoj, ; Ĉar l' original-poetoj ; Certe tro.. *malmutaj* estas." .....

'8 Kaj legant' ne kompreninte, ; Ke en tiu ĉi deklaro ; Kuŝas dika preseraro, ; Diris grave: "Bedaŭrinde!" .....